

# Aventura en mundo de sajnigado

Jean-Claude



Aventuro en mondo de Ŝajnigado

# **Aventuro en mondo de Ŝajnigado**

*Jean Codjo*

# **Aventuro en mondo de ŝajnigado**

*Flandra Esperanto-Ligo*

Tiu ĉi prov-libro estas libere kopiebla kaj transdonebla al ĉiu ajn.

## ***Aventura en mondo de ŝajnigado***

**E**stis dum iu lundo, tute varma tago kiel kutime en landoj ĉirkaŭ la ekvatoro. Estis varme, homoj ŝvitis, kvankam neniu tion rimarkis, ĉar ŝvitado estas ero de la ĉiutaga vivo en lando kie trinki akvon tute freŝan estas signo de luksaĵo. Tiu lundo, kvankam simila al ĉiuj aliaj tagoj de la semajno, estas speciala por Dossi. Post naŭmonata elteno de gravedo venis tempo por aldoni al nia jam popolriĉa planedo alian homon, unu homon plian. Ĉu por li jam estis antaŭvidita loko por dormi, manĝaĵo por sin vivteni, lernejo por sin edukadi, respondeco por plenumi? Ĉu brilas la suno, pluvas, kreskas arbidoj, flugas birdoj, pro plenumata respondeco de homo surtere? Por Dossi, homoj naskiĝas kaj mortas, egale ĉu ili tion deziras aŭ ne. Al Dossi estis tute egale ĉu ŝia filo venu al nia mondo iun lundon aŭ ne: lundo kaj aliaj tagoj de la semajno estas samaj, same kiel la horo aŭ la jaro dum kiu ŝia filo naskiĝis, ĉu la unua aŭ la dua horo, ĉu iu jaro aŭ la alia, statistikaj eroj ne gravas ĉu por ŝi, ĉu por aliaj enloĝantoj de ŝia vilaĝo. Nur gravas, ke unua filo ŝia naskiĝos, la naturo sendepende de la homaro prizorgos lin. Tiel estis la vivritmo en Dossihoue, senzorgoplena vivo, nestrikte planita vivo, nekontrolebla vivo, alivorte, vivo de homoj kun neskribaj reguloj. Tiaj homoj, laŭ vidpunktoj de Ne-Dossihouenu (ne-enloĝanto de la vilaĝo Dossihoue) estis for de la civilizacio, sekve ili estis primitivaj.

\*\*\*\*\*

Estis denove iu lundo, simila varma tago de Junio de la jaro 1994. Jeko, filo de Dossi, intertempe frekventis lernejon, eĉ ekstudis en la tiama unika universitato de sia lando. Intertempe evoluis vole-nevole pensmaniero en Dossihoue: scii kaj plani laŭ eŭropa vidpunkto iĝis pli kaj pli grava, eĉ scipovi la lingvon de Eŭropo iĝis kondiĉo por esti respektata. Jeko sufiĉe bone scipovas ne nur unu, sed kvar eŭropajn lingvojn. Li eĉ legis verkojn de famaj eŭropaj verkistoj : Goethe, Shakespeare, Blaise Pascal, ktp.

Tiun lundon de junio 1994 devis okazi plia paŝo al la civilizita mondo, surtera paradizo, kie vivas nur homoj kun honesta kaj klare esprimita intenco. Homoj el tiu mondo ĉiam estas ĝentilaj, pro tio ili sin permesis konkeri alian parton de la terglobo por instrui regulojn de ĝentileco al la homaro. Tiun lundon de 1994 Jeko devis enaviadiliĝi por la unua fojo kun la intenco konatiĝi kun la sekreto de sukceso de la paradiza mondo. En lia kapo interbatalis timo kaj ĝojo, fiereco kaj necerteco. Kiom longe daŭros la vojaĝo? Kiel funkcias tiu paradiza mondo? Kial oni tie sukcesas kaj ne en Dossihoue? Ĉu pro koloro de la haŭto? Sinsekvajn demandojn post demandoj Jeko faris al si kun la espero, ke li havos respondojn taŭgajn tuj kiam li elaviadiliĝos. Pri unu afero li jam certis: viziti paradizan landon ne eblas sen antaŭe montri iun dokumenton por certigi, ke temas efektive pri li, kiu rajtas tien iri. «Certe en tiu mondo, tia dokumento estas pli grava ol la homo» sin diris Jeko. La vojaĝo eterne daŭris, de Dossihoue al Germanio tra Libio kaj Moskvo.

## La troige planita mondo

**J**eko elaviadiliĝis ie en Germanio kie daŭre kuris homoj en diversajn direktojn. Kun rideto ĉelipe li provis saluti ĉiujn, sed neniu rimarkis lian intencon. Malgraŭ supozita aserto scipovi kvar eŭropajn lingvojn, li apenaŭ komprenis anoncojn el la laŭdparoliloj. Por la unua fojo, Jeko devis plani pri tio kion fari por eliri el la giganta flughaveno de Frankfurto, plani kiel eniri aŭtobuson, plani kiel denove eliri por entrajniĝi kaj finfine kiel atingi Hamburgon, kie jam atendis lin gastigantino. La tuta vivo konsistis el planado, antaŭvidado, por ne erari, ĉar eraro estas preskaŭ peko. Pordoj aŭtomate malfermiĝis, trajnoj preskaŭ neniam malfruis, matenmanĝo neniam prokrastiĝis, forkoj kaj kuleroj en la ĝustaj manoj manĝante, boligita ovo en antaŭplanita ujo, alivorte ĉio devis esti en sia loko. «Lando de la blankuloj estas efektive perfekta» opiniis Jeko. Dum tiu junio, kvankam brilis la suno, Jeko devis sin vesti varme, dum aliaj preskaŭ nude promenis kun rideto ĉelipe. En tiu ĉioplanita mondo, homoj certe devus emi rideti pro feliĉo aŭ pro iu kiu dum varma somero vestiĝas kiel dum vintro. Ĉiukaze, en JOVOTOME (lando de blankuloj) ĉio laŭ Jeko estas perfekta.



## Eko de ŝoko

Hamburgo estas giganta urbo kun gigantaj domoj, kie regas kulturo de gigantismo kaj de aŭtomatismo. Ĉio estas giganta kaj funkcias aŭtomate, eĉ la homoj estas grandaj. En tiu giganta urbo Jeko miras, kial homoj ne estas daŭre surstrate kiel ĉe li en Dossihoue, kie ĉiu konas unu la alian, salutas unu la alian, vizitas unu la alian sen antaŭe sin anonci. Jeko miris, ke lia gastigantino ne konas ĉiujn en la sama domo, kie ŝi tamen loĝas de jaroj. Por Jeko, se ĉio aŭtomate perfekte funkcias en Jovotome, la homa rilato ne strikte funkcias laŭ sama regulo. «Ĉu eble tio estas la unua sekreto de sukceso en Jovotome?» sin demandis Jeko. Ĉiukaze, li decidis ne plu rideti al ĉiuj, eble ĉar tio povus ofendi ilin. Almenaŭ neniu plendus, se li ne salutas, sed la malo povus okazi. Tamen en li ekis la unuaj demandoj sen respondoj: kial en tiu perfekta mondo homoj ne parolu unu al la aliaj ekster siaj domoj? Al kio ili daŭre alkuras? Ŝajnas, ke en Jovotome, kiam iu invitas la alian al trinkejo, ĉiu devas pagi por si mem. Tiajn subtilajn mesaĝojn Jeko tre certe ne tuj komprenas. Iam diris al li bela knabino jenan frazon: «Jeko, ĉu mi povas inviti vin por trinki kafon?». Jeko, kiu ne emas kafon tuj respondis per «NE». Post kelkaj tagoj, li eksciis, ke en Jovotome, inviti iun por trinki kafon povus signifi ke eble tiu interesiĝas pri eventuala amikiĝo kun li aŭ ŝi. La frazon komprenis Jeko laŭ signifo de ties vortoj, ne laŭ kultura konsidero.

En la ĉirkaŭo de la loĝejo de la gastigantino estas belaj domoj kun belaj aŭtomobiloj. Lia gastigantino tamen nur havas biciklon, eble ĉar ŝi estas malriĉa. Ŝi multe laboras per biciklo, flava biciklo kiu permesas al ŝi alporti novaĵojn al homoj ĉe ili. Kontraŭe al multaj hamburganoj ŝi kaptas okazon por alparoli homojn, ĉu pro devigo de sia laboro aŭ pro emo? Pri kialo de ago Jeko neniam petis, sed li trovis sian gastigantinon iom nenormala en la pozitiva senco kompare al multaj aliaj hamburganoj. Pli nenormala ŝi aspektas, kiam ŝi asertis ke ŝi tute volonte emas bicikli por savi la planedon. Por la unua fojo, Jeko aŭdis, ke la planedo tero estas savebla aĵo kaj pro la homa faro, ĝi povus esti en danĝera situacio. Por la unua fojo, Jeko aŭdis pri la medio kaj pri kondiĉoj konservi ĝin en bona stato. Rilato al la tero, al la medio kaj al ties bonstato aspektas sensencaĵoj por Jeko. Li ne povis imagi, ke la tero estis vivanta aĵo, pri

kies bonfarto oni devus atenti. Iom post iom Jeko ekdemandis sin ĉu lia gastigantino kune kun aliaj homoj en Hamburgo estis frenezuloj. En Dossihoue, de kiam ties enloĝantoj decidis komfortigi sian ĉiutagan vivon per teknikaj materialoj el Jovotome, jen iu en Hamburgo kiu opinias, ke daŭra serĉo de komfortiĝo per tiaj materialoj endanĝerigas la bonfarton de la medio. Kvankam la afero ege ŝajnis freneza, Jeko rimarkis, ke ne nur temis pri lia gastigantino, sed pri multaj aliaj, ĉu en Hamburgo, ĉu en Belgio, ĉu en Nederlando, kie li eĉ renkontis unu el la homoj, kiuj iom ekstreme adoptis tian vivstilon. Indas iom rakonti pri homoj en Nederlando, eble ne pri ĉiuj homoj, sed pri unu tute speciala. Lin renkontis Jeko iun someron, dum iu tute varma tago por li, sed ne por Jeko. En tiu giganta stacidomo de Amsterdamo, valizo ĉemane, Jeko atendis sian gastiganton laŭ instrukcio intertempe donita telefone. En la kapo de Jeko regis neniu dubo pri la graveco de la homo, kiu baldaŭ akceptos lin. Lia nomo estas sufiĉe konata en tuta Dossihoue, li perkoresponde rilatis kun centoj da Dossihouenu. Sendube ĉiuj, same kiel Jeko, pensis ke tiu homo certe estas riĉa ĉar li estas kapabla rilati kun tiom da homoj en Dossihoue. Konsiderinte lin kiel riĉulon, kiu posedus luksaĵojn, Jeko atendis ke sin montros iu kun plej multekosta kaj luksoplana veturilo. Fakte, la homo jam delonge atendis kun sia biciklo. Tion Jeko ne rimarkis, ĉar li dum la tuta tempo rigardis en la malĝusta direkto, precipe en la parkejo de aŭtomobiloj. «Ho ve! Jen alia homo kiu biciklas pro principo», sin diris Jeko pensante pri sia gastigantino en Hamburgo. Tiu homo biciklas dekojn da kilometroj por iri al sia laborejo, li ne manĝas viandaĵojn, ege malofte enaviadiliĝas pro respekto de tiu principo. Por Jeko, certe por ĉiuj Dossihouenu, devus esti iuj inter tiuj homoj en Jovotome, kiuj pravas aŭ freneziĝas: li ne povis kompreni, ke homo rezignis al luksaĵo pro principo. Tagon post tago la restado en Jovotome iĝis neeltenebla, konfuzoplana por Jeko, kiu sin demandis ĉu vere indis fari tian vojaĝon, kies celo estis por klerigi lin pri sekreto de materia sukceso de homoj en Jovotome. Pli kaj pli li rezignis pri serĉado de respondoj al siaj komencaj demandoj en Dossihoue antaŭ la forflugo. Post kvarsemajna konfuzoplana restado en Jovotome, Jeko ne plu kapablis elteni plian tagon. Li tuj deziris flugi hejmen. Eĉ tion li devis unue plani telefonante al la flugkompanio kelkajn semajnojn antaŭe. Paciencon pro tio li ne plu havis, lia gastigante prizorgis tion. Por li, estis nepre tempo tuj forflugi hejmen, kie certe atendis homoj kun la espero finfine scii pri la miraklo de sukceso. Pli kaj pli Jeko sin trovis en tikla situacio, konfuzoplana kaj senelireja. Anstataŭ nepre trovi respondojn, li decidis

nur akumuli informojn kun la espero digesti ilin kiam li estos for el tiu kompleksoplena mondo. Sed, almenaŭ, li lernis, ke homoj povas konscie rezigni al materia konfortiĝo, ne pro devigo, sed pro emo kaj principo. Li ankaŭ lernis, ke paralele al serĉo de materia komforto, estas ankaŭ idealo, laŭ kiu homo devus konduti. La difino de feliĉo kaj de bonfarto iom post iom ŝanĝiĝis en la kapo de Jeko. En Jovotome ne ĉio perfekte funkcias, ne ĉiuj ŝoforas belajn aŭtomobilojn, ne ĉiuj emas manĝi viandaĵojn, ne ĉiuj sin alkroĉas al akiro de materialoj, ne ĉiuj estas riĉaj, ne ĉiuj estas ĝentilaj, ne ĉiuj kredas je sama dio, sed ĉiuj nepre devas respekti saman leĝon. Eble, tiu lasta estas taŭga respondo al demandoj de Jeko.

## Sintransformiĝo

**J**eko revenis tute transformita, almenaŭ sur la kampo de pensmaniero. La tuta vilaĝo esperis, ke li kunportis ĉion kio igas homojn riĉaj kaj bonfartaj en Jovotome. Anstataŭ tio, Jeko sin vestis tute sobre, manĝis tute simplajn fruktojn, prelegis kun la intenco konsciigi aŭskultantojn pri protektado de la medio kaj pri la malagrabra sekvo de nepra akiro de teknikaj materialoj importitaj el Jovotome. Aŭskultantoj ofte kapjesis, kvankam Jeko konsciis, ke neniu kredis je tio, kion li intencis komprenigi. Pasis monatoj kaj jaroj, Jeko finstudis en la duagrada lernejo kaj devis daŭrigi en la universitato. Li studis lingvistikon kaj ĝermanistikon, amikumis, havis du gefilojn, sed ĝis tiam neniam edziĝis. Jeko ne sukcesis trovi inon en Dossihoue kun la kapablo plani kune kun li, fari intelektoplenan diskuton, ktp. Li emas kuiri, kaj por multaj inoj en Dossihoue, tio povus esti konsiderata kiel forpreno de unu el iliaj plenrajtaj taskoj. Eble Jeko iĝis tro intelekta por vivi kune kun ino, kiu sin kondukus laŭ la tradicia regulo en Dossihoue. Tamen, por ĉiuj Dossihouenu, Jeko estas sukcesplena homo sur ĉiuj kampoj. Ĉu vere?

## **Kio sub la glacimonto?**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **La dua nova vivo**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **La tria nova vivo**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **Ignorita mizero en Jovotome**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).



## **Enmigrintoj estu bonvenaj ĉe ni**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **Kulturo de odoro**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **Iluzio-plena libereco**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **Ruze organizitaj mensogoj**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **La mondo sub fokuso de elsendstacioj**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **Survoje al la iluzioplena paradizo**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

## **Sencela dialogo**

Tiu ĉi ĉapitro estas trovebla nur en la plena versio de tiu ĉi e-libro. Ĝi estas aĉetebla ĉe [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ retpoŝte ĉe [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).

# ***Kolofono***

**Titolo** Aventuro en mondo de Ŝajnigado

**Aŭtoro** Jean Codjo

**Kovrilo** Julia Litvinova

**Tekstaranĝo** Erik D'Hondt kaj Paŭl Peeraerts

**ISBN** 978 90 77066 42 3

**UDK** 82.3.892

**NUR** 300

**Leĝa depono** D/2009/2924/2

Flandra Esperanto-Ligo  
Lange Beeldekensstraat 169 - BE-2060 Antverpeno  
[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)  
© 2009 FEL, Antverpeno